Manresa, de la 24a ĝis la 26a februaro

Kongreslibro



Bonvenon al Manresa, kara samideano!

La Organiza teamo de la RenKEJtiĝo kaj la Kataluna Esperanto-Junularo ĝoje bonvenigas vin al tiu nova aranĝo!

La RenKEJtiĝo intencas esti la plej multnombra renkontiĝo organizita de la Kataluna Esperanto-Junularo, pensita por junaj esperantistoj ne nur el Katalunio, sed ankaŭ el eksterlando. La nomo devenas de vortludo inter la Esperanta vorto 'renkontiĝo' kaj KEJ, kiu ĝin organizas. Lastatempe, katalunaj gejunuloj komencis plimultiĝi en Esperantujo kaj oni bezonis renkontiĝon por interkonatiĝi kaj esti konataj eksterlande. Dum ĉi tiu semajnfino ni preparis plurajn aktivaĵojn: ekskursoj, Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj, gvidataj vizitoj al turismaj punktoj, *calçotada*, partoprenludoj, vingustumado kaj lokaj produktoj... Ĉio en Esperanto!

Ni fortege laboris dum monatoj klopodante oferi al vi mojosan aranĝon por montri kiel agas KEJ kaj kiom viglas Esperanto en Katalunio. La RenKEJtiĝo estas rezulto de teamlaboro, kunsidoj, vizitoj al Manresa, noktoj irante dormi malfrue, retpoŝtoj, energio, korektado de eraroj, personaj alportoj, ĝojo, espero... Kaj tio ĉion tradukeblas en kio ajn okazos dum tiu semajnfino.

Ĝuu, ridu kaj amuziĝu!

Benvinguts a Manresa,

La Organiza teamo de la RenKEJtiĝo kaj KEJ.

Programo

	Vendredo 24-a		Sabato 25-a				Dimanĉo 26-a	
			Libroservo disponebla tuttage				Libroservo disponebla tuttage	
		8 - 10	Matenmanĝo			8 - 9:30	Matenmanĝo	
		10 - 12	La historio de akvo en la urbo kaj vizito al la Muzeo pri Akvo kaj Tekstilo			9:30 - 10	Forlasi la ĉambrojn	
Ekde la 13:30	Akceptado	12 - 16	Tagmanĝo: *Calçotada* (Oficiala komuna foto)			10:30 - 12:30	Vizito al la la Groto de Sant Ignasi kaj Carrer del Balç	Kurso por komencantoj
16 - 18 (proksimume)	Ekskurso al la turo de Santa Caterina	17 - 19:30	Prelego: Pluvo, ŝvito, nuboj kaj vaporo. Ĉiutaga scienco pri akvo	Kurso por meznivelanoj	Kurso por komencantoj	12:30 - 16	Vizito al la Fira de l'Aixada (manĝbudoj por tagmanĝi)	
18 - 20:30	Ludoj por konatiĝi		Enkonduko al la kataluna lingvo			16	Ekforiri de Manresa	
20:30 - 21:30	Kundivida vespermanĝo	20:30 - 21:30	Loĝeja vespermanĝo					
21:30 - 23	Vingustumado Pla de Bages	21:30 - 23	Dolĉa trinkomanĝa nokto					

Programo

Vendredo la 24-a

Ekde la 13:30 la Gastejo permesas al ni komenci lasi valizojn tie, do kiam homoj alvenas ili povas lasi siajn pakaĵojn tie kaj ekloĝi en siaj ĉambroj. Kiam la pakaĵoj estas lasitaj ni donos al vi la kongressakon kun la informaĵoj kaj donacoj. La tagmanĝo estas libera por ĉiuj en la centro de Manresa. Ni planas ke homoj alvenos posttagmeze, do baldaŭ antaŭ vespermanĝo ni faros la oficialan bonvenigon nome de KEJ, ankaŭ nomrondon kaj ludojn por ekkoni nin pli bone. La vespermanĝo komenciĝos je la 20:00 kaj precipe estos kolbasoj, omletoj kaj komune alportitaj manĝaĵoj. Je la 22.00 ni organizos vingustumadon de la Devennomo Pla de Bages por konatigi katalunan vinon al eksterlandanoj.

Devennomo Pla de Bages
La **DOP Pla de Bages** protektas la vinojn produktitajn en 26 municipoj kiuj apartenas al la regiono Bages, en la koro de Katalunio kaj proksime de la montoj de Montserato. Ĝi estas areo kun granda vintradicio fakte, laŭdire la loka nomo de Bages devenas de "*Bacus*", la pagana dio de vino. De *Bacus* devenis *Bacassis* kaj poste Bages.

La karakteriza vino de la areo estas *Picapoll*, helblanka vino kun karakteriza flava koloro. Aliaj blankaj vinoj, de *Macabeu* aŭ *Chardonnay*, estas fruktecaj kaj gustas malpezaj. Koncerne ruĝaj vinoj, ili estas aromaj. La plej kultivitaj vinbervariaĵoj estas la *Ull de llebre* (okulo de leporo), *Cabernet-Sauvignon*, *Merlot* kaj *Sumoll*.



Sabato la 25a

Matenmanĝo komenciĝas je la 8.00. Ni eliros el la gastejo je la 10.00 por malkovri la historion de akvo en la urbo, kiu finiĝos per vizito al la Muzeo pri Akvo kaj Tekstilo, gvidota de Krishna Sivillà.

Akva kaj Tekstila Muzeo



La Akva kaj Tekstila Muzeo gastigas du elstarajn ekspoziciojn, kiuj temas pri la graveco de akvo. Ekspozicio pri la Sèquia (akvofosaĵo) klarigas la rolon de la akvofosaĵoj el historia perspektivo kaj substrekas precipe ĝiajn efikojn por la kreskado de agrikultura produktado kaj urboplanado ekde la Mezepoko. Aliflanke, ekspozicio pri la *cinteria* (bend-produktado) klarigas la gravecon de ĉi tiu industrio en la urbo, kiu estas la granda referenco de la sektoro en la hispana merkato.

Revenante ni promenos ĝis fajrejejoj (barbacoa) Mas Portell, proksimume 40 minutojn de la Muzeo kaj 20 minutojn de la Gastejo.

Ekde 12:15 pli-malpli, ni komencos preparaĵojn por servi tipan katalunan manĝon: la *calçotada*. Ni povos montri al vi ĉi tiun “riton” tiel unika por baki kaj manĝi junajn cepojn. Estos opcio kun viando kaj sen, ambaŭ je prezo de 15 € (14€ por aliĝintoj a la RenKEJtiĝo). Alveninte al la gastejo ni disdonos biletojn por la *calçotada* (kiun vi devos aparte pagi). Ni atendas, ke ĝi finiĝos je kvarono antaŭ la

kvina (16:30 aŭ pli), ne sen antaŭe fari komunan foton kun ĉiuj partoprenantoj de la RenKEJtiĝo.



La kalsotado estas tradicia festo en Katalunio dum la monatoj de Februaro kaj Marto. Oni kunvenas kaj rostas la kalsotojn (juna kaj longigita cepo) sur krado kaj poste oni manĝas ilin.

Ĝi estas vere tradicia kaj populara. La devenloko de tia festo estas en la sudo de Katalunio, en la urbeto Valls, proksime al la urbo Tarragona. Iu komencis kultivi menciitajn cepojn antaŭ 200 jaroj. Ĉe la komenco oni manĝis ilin en la urbeto Valls, poste en Tarragona sed nun oni manĝas kalsotojn en la tuta Katalunio.



Oni mangas ĝin kun specifa saŭco: *Romesco*. La bazo estas miksaĵo de migdaloj, aveloj, rostitaj tomatoj, salo, rostita kaj kruda ajlo, oleo, pipro, vinagro kaj juglandoj (kelkfoje oni enmetas frititan panon ankaŭ). Ĉiu familio tamen havas sian sekreton pri la preparmetodo kaj la ingrediencoj de ĉi tiu saŭco.

De 17:00 ĝis 20:00 okazos kursoj de Esperanto (por komencantoj kaj meznivelanoj).


Vespermanĝo estos en la gastejo mem kaj okazos de 20:30 ĝis 21:30. Post la vespermanĝo okazos tipa evento de Esperantistaj junularaj renkontiĝoj: la trinkomanĝa nokto! En ĉi tiu kazo, ĝi estos dolĉa trinkomanĝa nokto, sed la dinamiko estos la sama: lokaj kaj tutmonde partoprenantoj alportas iom da manĝaĵo kaj trinkaĵo (ofte alkoholaĵo) tipaj de kie ili venas. La LKK pensis, ke estus bona ideo fari ĝin nur dolĉe, tiel la vespermanĝajn desertojn estos farota kune, neformale kaj amuze.

Dimanĉon la 26-an

Matenmanĝo komenciĝas je 8.00 kaj finiĝas je 9.30. La gastejo petas nin forlasi la ĉambrojn je la 10:00, sed ili permesas al ni lasi niajn pakaĵojn ĝis ni volas foriri. Je la naŭa kaj duono komenciĝas la kursoj de Esperanto laŭ nivelo kaj por tiuj, kiuj ne havas kurson, ni ankoraŭ organizas atelierojn kaj prelegojn. (Ni informos al vi baldaŭ).

De 10:30 ĝis 12:30 ni vizitos unu el la plej emblemaj lokoj de Manresa: la Groto de Sant Ignasi kaj/aŭ Carrer del Balç.

La Groto de Sant Ignasi



Ĝi estas, kune kun la *Seu*, unu el la plej vizitataj lokoj en la urbo. Krome, ambaŭ lokoj estas pilgrimlokoj kaj gravaj centroj de spiriteco, precipe por la jezuita komunumo. Ignaco de Loyola piediris de Montserrat ĝis Manresa en 1522. Konfesinte en la monaĥejo de Montserrat en 1522, li izoliĝis en kaverno apud Manresa (en la provinco de Barcelono) kie li vivis kaj preĝis dum dek monatoj kun granda severeco, post kio li entreprenis pilgrimadon al Jerusalemo. Ĉi tie li pasigis dek unu monatojn, tempo de granda graveco por lia vivo kaj por la nasko de la Societo de Jesuo (Jezuitoj).

Lia privilegia loko de preĝo estis la Groto. Ĝi estas natura truo (bauma) ĉe la Cardener-rivero, elfosita pro la rivera erozio dum la Terciara periodo. La sperto vivita ĉi tie por Sankta Ignaco estis la origino de lia libro Spiritaj Ekzercoj. La plafono de la kaverno memorigas la stilon de la Kataluna Renesanco. Josep Llimona simbolis, per du bronzaj anĝeloj, la preĝon kaj pentofaradon, kiujn Sankta Ignaco faris en ĉi tiu loko. Sur la planko, ĉio mozaike, ni povas vidi la blazonon de la Loyola familio, kanonon kiu memoras la vundon de la sanktulo kaj grandan sunfloron kiu simbolas la koron de Ignaco malfermiĝanta al Jesuo.

Lokata en la kromkonstruaĵoj de malnova nobela domo, la lerno-centro Carrer del Balç permesas al vizitantoj vidi kia estis Manresa en la 14-a jarcento. La vizito baziĝas sur

rakonto centrita sur la figuro de reĝo Petro III la Ceremonia.

Carrer del Balç

Carrer del Balç (Klifa Strato) estas grandioza ekzemplo de mezepoka kataluna urbismo. La strato estis la kerno de la mezepoka grandurbo, situanta ĉirkaŭ la nuna Plaça Major. Kun mallarĝa kaj kurbiĝema aranĝo, la strato adaptiĝas al la profilo de klifo, kun diversaj ŝanceligitaj niveloj. Unu el la plej specialaj trajtoj de tiu ĉi spaco estas ĝia kovrado, kreita de la verandoj konstruitaj inter domoj, fine de la mezepoka periodo por profiti la malabundan spacon kiu estis en la murita urbo.




Profitante ke estos manĝbudoj ĉe *Fira de l'Aixada*, ĉiuj povos manĝi kion oni volas kaj gustumi produktojn de lokaj kuiristoj kaj produktantoj.

Je la 16:00 ni planas ekforiri de Manresa (ni scias, ke estos homoj kiuj devos preni aviadilojn, trajnojn, ktp.). Tial, la Ĝiso komenciĝos je la kvara horo.

Por tiuj, kiuj devas preni trajnon Rodalies al Barcelono, estas la R4 kaj R12, kiuj pasas je 4:00 kaj 4:30 p.t.m.

La urbo: Manresa



Manresa estas la ĉefurbo de la komarko Bages, en la Provinco de Barcelono, Katalunio. Ĝi troviĝas ĉirkaŭ 60 km de la urbo Barcelono, en la koro de Katalunio, kie markas limojn inter la industria suda regiono kaj la pli kampara norda regiono.

Manresa havas fabrikojn de teksaĵoj, ŝpinitaĵoj, kemiaĵoj kaj maŝinaro. En la lastaj jardekoj ĝi substituis la industrion al la komerco. Estas urbo kun interesa aro da mezepokaj kontruaĵoj, kun sia ponto super la rivero *Cardener* kaj sia gotika preĝejo (nomita *La Seu*, katalune). Krome oni povas ankaŭ trovi barokajn preĝejojn kaj interesajn modernismajn konstruaĵojn.



Ĝi situas precize en la angulo kie 5 km distance kunfluiĝas de la riveroj *Llobregat* kaj *Cardener*. Ĝi estas grava nodo de komunikvojoj, aparte kun la Ŝoseo de la Llobregat, inter la montoj kaj la maro, kaj la Transversa Ŝoseo, inter la internaj valoj de *Urgell* kaj *Segarra* kaj la orientaj regionoj de la lando. Manresa ĉiam ludis tra la historio tre gravan rolon en la administra organizado de centra Katalunio.

Manresa havas famegan basketbalklubon (BAXI Manresa) kiu

ludas en la ACB-Ligo, la plej alta ŝtata Ligo el Hispanio. Ili ankaŭ ludas en la Eŭropa Basketbalo-Ĉampionligo. Inter ĝiaj titoloj estas la ACB-Ligo, la *King's Cup*, la LEB Ora Ligo kaj tri Katalunaj Ligoj.

Esperanto en Manresa



En Manresa, je la komenco de 20-a jarcento, Josep Albagés Ventura fondis Esperanto-grupon kaj tie estis Katalunaj Kongresoj en la jaro 1923, 1936 kaj 1999.

En Manresa, en 1922 grupo de intelektuloj fondis la esperantistan organizon Bela Espero, kiu faciligis la liberan instruadon de la lingvo kaj konservis kontaktojn kun esperantistoj ĉie. Ĝia prezidanto estis la instruisto Josep Albagés.

Dum la Hispana Respubliko kreskis intereso pri Esperanto. En 1936, Bela Espero, tiam prezidita de la poeto Antoni Muset, organizis la Esperantistan Katalunan Kongreson en Manresa (estis la duan fojon la urbo gastigis ĝin: la unua estis en 1923). La kongreso kunvenigis amason da esperantistoj el la tuta Katalunio kaj aliaj naciecoj. La Kongreso inkludis Internaciajn Florajn Ludojn, kiuj okazis en la aŭditorio de la Kazino, kun premioj por originalaj verkoj



kaj por tradukoj de katalunaj verkoj. La eksterordinara esperantista vigleco de la jaroj de la Hispana Respubliko estis finigitaj pro la Hispana Enlanda Milito kaj la Franka reĝimo.

La gastejo



La gastejo Manresa Xanascat estis konstruita en la 14a jarcento, historie havis plurajn uzojn. Unue, ĝi estis monaĥejo de karmelitaj monaĥoj, poste armea kazerno kaj fine publika (municipa) konstruaĵo. Ekde 1990 ĝi estas unu el la gastejoj parto de la reto de Junulargastejoj de la *Generalitat* (Kataluna Reĝistaro). Lokata en la historia centro de la urbo, estas facile promeni ĝis la plej emblemaj stratoj kaj malkovri la kulturan kaj naturan heredaĵon de Manresa. Ĝi estas urbo kiu enhavas multnombrajn foirojn kaj festivalojn, kulturajn, gastronomiajn kaj sportajn eventojn tutjare. Kaj ĉio ĉirkaŭita de naturo.

La ĉambroj havas 2, 3 kaj 6 litojn kun banĉambro kaj 6, 8 kaj 16 litajn ĉambrojn kun komuna banĉambro. Akcepthoroj estas de 8 ĝis 10:30. Horoj de eniro kaj eliro: de 8 ĝis 22:30 Je la 23-a la pordoj fermiĝas kaj oni petas ne tro brui.

Sciindaĵoj pri la Urbo

- Manresa estas la urbo en Hispanio kie okazas la plej alta numero de malfidelecoj, laŭ la ranking *Ashley Madison*. Estas pli ol kvar katalunaj urboj kun la plej multaj malfidelecoj ŝtate. La supraj urboj estas la sekvaj: Manresa, León, Barcelono, Granado, Sabadell, Bilbao, Madrido, Valencio kaj Alakanto. Eble vi povas partopreni pligrandigi tiun statistikon dum via restado en Manresa...
- La plej famaj manrezanoj estas:
    - Jordi Cruz (kuiristo kaj kondukisto de Masterchef)
    - Pere Tarrés (kontraŭfaŝisma pastro, li nomas faman fondaĵon en Katalunion)
    - Joan Ribó (urbestro de Valencio)
    - Núria Picas (atletino, fama por esti unua virino kuri Himalajon sen oksigeno)
    - Jordi Wild (fama hispanlingva youtuber, konata pro memeoj)



- Fama kantisto Rosalía havas domegon apud Manresa, kundividite kun portorika reaggetón kantisto Rauw Alejandro.
- Shakira filmis muzikvideon de ŝia kanto 'Monotonía' en manreza bazaro, kune kun kantisto Ozuna.

Pri KEJ

Kataluna Esperanto-Junularo estas la junulara Esperanto-organizo de Katalunlingvaj teritorioj. Neformale fondita fine de la 1970-aj jaroj, ĝi

formale ekfunkciis en 1981 kiel sekcio de Kataluna Esperanto-Asocio kaj ekeldonis la revuon *Kata Luno*. En 1988 ĝi fariĝis, inter multaj ebriaĵoj, Landa Sekcio de TEJO!

Post vigla aktivado ĝis la komenco de la 1990-aj jaroj, ĝi stagnis ĝis ĉirkaŭ la jaro 2000, malgraŭ en 2005 kaj je la komenco de la dekaj jaroj novaj generacioj de aktivuloj el Katalunlingvio intencis relanĉi la organizon, sensukcese.

Ĉirkaŭ 2018 nova generacio de aktivuloj refondis KEJ, kaj post grandaj klopodoj, nia asocio jam viglas kaj sukcese disvastigas Esperanton en Katalunio nuntempe pere de regulaj okazaĵoj kiel eo-kursoj, bierumadoj kaj internaciaj projektoj.

Ĉu vi sciis...?
Laŭ lastaj sciencaj raportoj, KEJ estas unu el la Esperantaj Junularoj kun plej alta indekso de Krokodilado. Ĝi estas ofta kutimo inter siaj membroj (krom Siru). Malgraŭ tio, spertuloj ankaŭ indikis ke ekzistas rilato inter krokodilado kaj mojoseco, specife en Sud-Eŭropaj junularaj asocioj.

Pri Loka ““Kongresa”” Komitato

Kontaktu nin kaze de problemoj aŭ gravaĵoj. Se via dubo solveblas per tiu Kongreslibro, bonvolu legi ĝin antaŭ ol telefoni. Moltes Gràcies!

- Jordi Calafí : @jordi_calafi (+34 639 686 797)
- Krishna Sivillà : @krisxna
- Lucía M. Fernández : @lucifdez17 (+34 652 675 397)

- Òscar Hernández : @oscar_h_r
- David Ruíz : @DavidoEO (+34 628 576 438)
- Pol Jiménez : @poljisach
- Siru Laine: @Thyella